



BOLETIN

Núm. 11

NOVIEMBRE
1949

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

EL SEGUNDO LENGUAJE

El actual estado del problema lingüístico, en todo el mundo, varía de lo inquietante a lo candente, según las circunstancias geográficas de cada país.

De muy distinta manera ha de considerarse este asunto en Austria, por por ejemplo, que en España:

Es natural que en el centro de Europa, entre cinco o seis civilizaciones distintas, al paso de todas las rutas comerciales, turísticas... y bélicas, el problema sea candente. No así en España, casi insular, separada, más que unida al resto de Europa por los Pirineos, en relación poco intensa con los países del continente, a consecuencia de las barreras económicas levantadas por la postguerra, y con un nexo indestructible con los países iberoamericanos, con los que no existe el problema lingüístico.

Pero, lo que hoy es asunto diferible, se ha de transformar en un próximo futuro en acuciante y perentorio problema. España tendrá que incorporarse a la vida activa de relación; el comercio que ha de producirse, por exigencia de nuestras necesidades de abastecimiento industrial, ha de tener una intensidad mucho mayor que la que podamos imaginar. Los ferrocarriles franceses necesitan, a lógica prolongación hacia Marruecos, nuestra red de ferrocarriles. Nuestros aeropuertos, ya considerados entre los más importantes, han de ser punto neurálgico de las comunicaciones de toda Europa con América y África, y de América con el próximo Oriente.

Y entonces surgirá, con imperativo de congoja, la necesidad de la intercomprensión. Los espíritus simplistas creerán que el problema está ya resuelto con la admisión del idioma inglés para todos los menesteres internacionales, pero están muy equivocados.

No se trata solamente de la negativa de muchos países para la adopción del idioma británico. Ya hemos señalado algunas veces hechos concretos en este sentido.

La India y Egipto, tan ligados a Inglaterra por vínculos de cultura, se desligan de ella por razones de nacionalismo activo y proscriben el inglés. Hoy, es el extremo opuesto el que rompe el vínculo idiomático; la joven república israelita, en cuya formación tanto influyeron poderosos elementos judaicos ingleses y, más aún, norteamericanos, proclama su disconformidad con el idioma inglés, y prescribe el francés para sus necesidades de relación.

Todos estos y otros datos semejantes, demuestran que el asenso no es general, y que el inglés, no solamente no sería aceptado por franceses y españoles, que nunca renunciarían al uso de su idioma, tanto o más rico que el inglés en tradición, riqueza literaria, facilidad de enseñanza, etc., sino que tampoco lo sería por otras nacionalidades que, a primera vista, parecen vinculados en la órbita cultural británica... Pero, la verdadera razón para repudiar la lengua de Milton y de Dickens, no es de índole política, sino simplemente... lingüística. ¡Es que el inglés no sirve más que para los ingleses! El mundo necesita un idioma sencillo, útil y neutral.

El mundo necesita un idioma en el que, tras un estudio de pocos meses, se pueda hacer algo más que traducir la cabecera de un artículo o el rótulo de una tienda, o cuanto más, balbucear unas preguntas sin garantías de comprender la contestación, que es lo que suele ocurrir después de algunos años de estudiar inglés. ¡Seamos sinceros! ¿No es este el resultado alcanzado por el noventa por ciento de los estudiantes de la lengua inglesa? ¿Cuántos pueden vanagloriarse de «poseer» la lengua de Byron sin haber estudiado en Inglaterra?

El mundo necesita un «segundo lenguaje», común a todos, neutral y sencillo, utilizable, no solamente por una minoría selecta, sino por la masa general, en pie de igualdad con todos los demás países, y cuya utilización haya sido comprobada por los filólogos y por los hechos prácticos.

Treinta y cuatro congresos internacionales, con asistencia de más de treinta distintas nacionalidades, son la ejecutoria del Esperanto, el idioma vivo que, con copiosa literatura propia, ha demostrado ser la única solución para el problema lingüístico: el segundo idioma para todos y cada uno de los habitantes del mundo.

ĈU ESPERANTO DISDIALEKTIĜOS?

De J. REGULO PEREZ
Kanariaj insuloj

Jen la demando, kiun tre ofte oponas al Esperanto multaj etmensaj ŝajnlingvistoj, kiuj, iom traleginte pri lingvoscienco kaj sociologio, vantpufiĝas kaj sin kredas spertaj por orakoli pri ĉio ajn; ili ja respondas plej sufiĉe: «Jes, Esperanto ja disdialektiĝos; tion plej konvinke instruas al ni la historio de la pralingvoj: sanskrita, greka, latina, slavona, germana, ktp. Se same—neprobablajo!— iam estonte Esperanto fariĝos lingvo vaste uzata, nepre ĝi disfalos dialekten».

Kaj tamen, se iom pli atente ni ekzamenas tiun saman historian proceson, verdire ja ni povas konkludi la malon. Fakte, la sanskrita lingvo disdialektiĝis en multajn praktikajn idiomojn, libere evoluante inter senabocaj gentoj; sed kiam la geniulo Panini starigis plenan gramatikon de tiu lingvo—foje iom arbitre kaj eĉ artefare!—, ĝi iĝis por ĉiam fiksa interhoma esprimilo, per kiu floris hinda nacia literaturo, ĉefe ĉe ties teatraj verkoj. Samtempe ĝi fariĝis lingvo religia, kaj sensanĝe ĝi estis ĝisdata pera kulturilo inter la hinda multlingveco.

Same okazis ĉe la lingvo latina. Dum ĝi libere evoluis sur plej disaj anguloj de la vasta Roma Imperio— ĉe kiuj cetero, ĝi subigis, sed ne tute neniigis, ties landidajn idiomojn—, ĝi naskis la lingvojn romanidajn; sed kiam, post la ekestiĝo de tiuj inter si duonfrataj lingvoj, ĝi ĉesis esti esprimo de senaboculoj kaj iĝis rimedo de kulturitaj homoj kaj de la kristana eklezio, ĝi restis ĝis hodiaŭ tute sensanĝa, praktike egala, sur praklasikaj modeloj. Iel iom simile oni povus ekzempli ĉe la slavona kaj germana pralingvoj.

Kaj, kio okazis poste, ekzemple, en la latinida hispana lingvo? Ekde kiam ĝi ekis memstarigi disde la latina, ĝis ties unua al ni konata grava lingva monumento, la epopeo *Mio Cid*, plenumiĝis en ĝi daŭre tiom da ŝanĝoj kaj aliĝoj, ke ĝin jam ne plu rekonas romano el la tempo de la nordgentaj invadoj, se hipoteze li povus esti ĝin aŭs-

kultinta. De tiu dato, XII^a jarcento, ĝis komenco de la XVI^a, ni konas iom detale la ŝanĝojn dume plenumiĝintajn; ili estas senkompare malpli gravaj kaj ege multe malpli nombraj: ia cidano estus ja kompreninta kavaliron en la kortego de la reĝino Johana. Poste, kun ĉiu jarcento, la evoluaj aliĝoj iĝis pli kaj pli malĉefaj, malgravaj, pure blankaj, akcesoraj.

Dume Hispanio konkeris mondon pli vastan, ol la tuta Roma Imperio. kiam ĉi tiu estis ĉe sia disvastiĝa zenito. Sur tiu nova mondo, post kvar jarcentoj da hispana regado, aras nun tute sendepende duĉeko da ŝtatoj, kiuj, ĉiuj, parolas hispane. La tempoforpasso sur la disvastiĝa areo de la hispana lingvo, nur iĝis ĝin pli konservema, ĉiam pli kaj pli unueca, malgraŭ la diseco kaj senbara evolueblo de ĉiu aparta komunumo. Ekde la konkero de Ameriko ĝis nun, la hispana lingvo apenaŭ ŝanĝiĝis; male, hodiaŭ la ĝenerala kleriĝo, radio, sonfilmoj, libroj, gazetoj, paroloj, ĉio... tendencas al unueciĝo. Kaj unueco ja estiĝas, okazas, ĉiutage pli senteble.

Kion ni povas aŭ rajtas konkludi el tio? Jen: la disdialekteblo de la hispana lingvo, anstataŭ alproksimiĝi ĉiutage, dank' al la ĝenerala kleriĝo kaj ĉiufoje pli senbara komunikeblo, iĝas pli malproksima, malforta, malebla.

Nu, ni nun do transitu la saman rezonan superrigardon al la esperanta kampo. Se ni atente studas la ĝisdatan historion de nia lingvo, ni povas konstati, inter aliaj, jenajn faktojn. Dum la unua periodo de sia vivo, la lingvo Esperanto estis forte influata de la tiel nomata rusa-pola tendenco; poste venis la franca periodo, kiun kunsekvis iom interkroĉe la germana, sed ambaŭ kun propraj trajtoj por pravieblo de distingo; apud tiuj, kreskis iel tipa SAT— Esperanto kaj la grava Esperanto de la japanoj. La fakta ekzisto de almenaŭ tiuj kvin klare apartigeblaj Esperanto— elvolviĝaj emoj estas la plej trafa post-

pravigo de la konkludo al kiu venis la ĉefaj esperantistaj eminentuloj, kiam dum la kriza ido-naskiĝa periodo (1908-1910) ili starigis la demandon: «Kio estas kaj kie estas la modela Esperanto?» Tiam la respondoj de la superaj kompetentaj esperantistoj preskaŭ unuanime aljesis: «La modela Esperanto ne ekzistas en presita formo».

Lingvo, tamen, estas socia fakto, kolektiva kreaĵo. Per la kunhelpo de ĉiuj tiuj supre cititaj tendencoj; per la kun-kreo de la budapeŝta skolo arĝinta ĉirkaŭ «Literatura Mondo»; per la kun-nago de la amsterdama skolo ĉirkaŭ «La Progresanto»; jam per la kunfrapo de la SAT— kaj EKRELO—eldonaĵoj; ktp., jen ekestiĝis, kolektive forĝita, pli pura, pli internacia— aŭ pli ĝuste: pli eksternacia aŭ eksnacia— Esperanto, ol iam ajn antaŭe. Nun Esperanto, socia fakto, kolektiva kreaĵo, estas pli unueca, ol dum iu ajn antaŭa periodo de sia publika vivo. La disdialekteblo rapidepaŝe retroiras en la lingvo. La lingvaĵo de «La Revuo Orienta» (Japanio), «Internacia Kulturo» (Bulgario), «Esperanto» (Svisio-Britio), «Sennaciulo» (Francio), «O Brasil Esperantista» (Brazilio), «La Rondo» (Aŭstralio), por citi nur kelkajn ekzemplojn, ampleksantaj malsamajn tutmondajn kulturojn, estas senteble la sama.

Alia ne preterlasebla maldialektiga faktoro estas la nunaj vortokonstruaj emoj de la lingvo. Esperanto, esence kaj fundamente, estas alglua, kunmeta lingvo, kun libera eblo por enkonduko de fremdaj, t. e. internaciaj vortoj. Ĉiuj, sed speciale ja la franca periodo, ne atentis sufiĉe tiun bazan konsiston de Esperanto kaj senbezone ŝveligis la leksikonan trezoron per centopa enkonduko de pseŭdointernaciaj radikoj, kiaj, ekzemple: *admiralato* (=admiralejo), *administracio* (=administrejo), *arhipelago* (=insularo), *sarkojago* (=ĉerkujo), *alfabeto* (=aboco), *observatorio* (=observejo), ktp. Nun la lingvo jam sentas sin forta por repuŝi tiujn leksikonajn balastojn, libera de nacilingvaj emoj kaj de pseŭdointernaciaĵoj, kapabla riĉiĝi per kreado el la propra trezoro fundamenta kaj el la aldonoj, kiujn en tiu sama spirito la lingvo alpropr-

gis. La novaj formoj—ja veraj kaj salutindaj, envenindaj neologismoj!— estas tute logikaj, laŭgramatikaj, elforgitaj en la Esperanto-fandeco mem.

El tiu ena, purisima emo de la lingvo jam konstateblas pluraj tendencoj. Apud la malnovaj: *redakti*, *redaktoro*, *redakcio*, jen pompas *redakti*, *redaktiste*, *redaklejo*. Estas plezuro trovi *terminaron* apud *nomenklaturaro*, *ministrejon* apud *ministerio*, *presarton* apud *tipografio*, *landidon* apud *indigĉeno*, *kaŝnomon* apud *pseŭdonimo*, ktp. Tiel, sen forstreko de la malnovo, sen rompo de la tradicio—grava faktoro, kiu ĉefe konsistigas lingvon!—, per la vojo de arĥaismiĝo al malkongruaĵoj, jen nia lingvo fondas siajn erojn el si mem, en sia propra spirito, kun ĉiufoje pli forta dinamiko elinterna. Kiom da enlingva riĉiĝo prezentas la radikigo, gramatikigo de afiksoj kaj ceteraj lingvoelementoj. Nun licas— kaj estas esprime trafaj— vortoj, kiaj: *geo*, *bocco*, *areto*, *ineto*, *elpreza*, *egpreza*, *ilaro*, *inda*, *ularo*, *egulo*, *ĉetulo*, *insekso*, *ccaro*, *crigi*, *anigi*, *idaro*, *ulineto*, ktp. Paralele, preskaŭ ĉiuj jam kun literatura historio, viciĝas *ĉui* (=demandi), *ĵora* (=malproksima), *ena* (interna), ankaŭ *o-vorto* (=substantivo), *a-vorto* (=adjektivo), *i-vorto* (=verbo), *e-vorto* (=adverbo), *obligh* (=multipliki), *onigh* (=dividi), *plusi* (=adicii), *minusi* (=subtrahi), *isa* (=pasinta, preterita), *asa* (=estanta, prezenta), *osa* (=estonta, futura), *ĉii* (=ci-alparoli), aŭ la lasta, kiun mi ĵus konstatis, prepoziciigo de la afikso *pra*:

Pro kia indo en la kerno saviĝis mi kaj mia genro, juste punindaj por eterno pro l'pekaj faroj de Eva, Adamo kaj la Vermo *pra* ses mil jaroj.

(R. ROSETTI, «Lit. Mond.» III, 1940, p. 111, kol. 1.^a)

Ne, decide kaj firme ne. Lingvo, kiun sur la tutmonda areno posedas tiom fortan enan dinamikon, ne disdialektiĝos. Tiun aserton ja pravigas la historio de la lingvo mem, kiu, el naciinfluaĵaj disemoj, jam klarvenke iras al ĉiam pli kohera evoluo, pli integra unueco, sur pli sekura bazo.

Papilioj de laŭtuno estas la sekaj folioj, kiuj flirtas kaj petolas en aero, prokrastante la momenton fine ripozi sur tero. Kvazaŭ veluraj manetoj, ili adiaŭas la fortikajn branĉojn, kiuj nun restas nudaj, sen la verda ornamo de sia densa foliaro, kiu iam tegmentis kaj ĵulis la nestojn aŭ kribris la oron el sunaj radioj. Iom post iom, la arboj perdas siajn mildajn konturojn; fariĝas videbla pli kaj pli ilia trabaro, kiel bruna skeleto el masiva ligno. Tra ĉa vojoj kaj vojetoj, tapiŝitaj de falintaj velkantaĵoj, venis diligente la kuriero kun abunda pakaĵo de revuoj kaj gazetoj; krom tio, venis ankaŭ kelkaj leteroj de diversaj samideanoj, kiuj per afablaj vortoj min salutas kaj gratulas; unu el ili eĉ kortuŝe min konsolas divenante, ke ne pro nenio veis per melanĉolio mia lasta kroniketo... Ĉu vere la koboldetoj ankaŭ suferas kaj ankaŭ ĝojas? La demandon ne tordu vi, tamen, ho kara leganto, dirante anstataŭe: Ĉu vere la koboldetoj ekzistas? Jes, ili ankoraŭ ekzistas tie, en la idealaj regionoj de la puraj pensoj, kie nur la poezio regas. Mi scias, ke jukas ĉe multaj tikla sciivolemo koni la personon, kiu—laŭ ili—sin kaŝas malantaŭ la stupo de mia barbeto. Sed, kial do tiu ĉi emo tiri la kurtenon de la fantazio, por malkovri trivialan realon, kiu tro ofte en la vivo reala sufiĉe enuigas? Se ne pro klaraj aliaj motivoj, estas ja enviindaj la infanoj pro tio, ke ili kapablas vidi kvazaŭ ekzistantaj la pejzaĝojn, kiujn ŝovis en mirindajn librojn la imago de artisto. Nu, estu vi ankaŭ infano naiva, dum mallonga daŭro; gardu tre ĵaluze la ĉarman trezoron de via naiveco, kaj lasu vin porti efemere en landon de l'sonĝo kaj revo. Ne punu vi vin per la puno de tiu disreviĝo, kiu certe vin kaptos, kiam, detruante la magian nebulon, kiu min ekestigas, vi renkontos min nur sub la formo de vulgara homo, kun vulgara nomo, kaj... eĉ kun vulgara triaklasa kolekto da kuponoj por la porciigado, sed ne plu jam kun la

serĉa kapablo konfidence alparoli besetojn kaj florojn, same kiel tiu koĉenilo kaj tiu lekanteto, kiuj, dum printempo, donacas al mi siajn ĉastajn sekretojn, apud la veŭuro de iu trifolio, iel simila la verdan stelon de la esperantismo... Ho! ho! kiel vulgare ankaŭ mi perdis konscion pri spaco kaj tempo... Decas do nun ekagi rapide por povi rakonti iomete pri lastaj novaĵoj el la gazetaro. Tial, jene mi komencas, sen plia enkonduko:

Estu la unuaj komplimentoj por du novaj vizitantoj: VERDA STELETO regule aperanta revueto en Italio, organo de Centra Esperanto-Oficejo, juna

INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

entuziasmo svarmas ĉie de tiu simpatia kolegeto. AŬSTRIA ESPERANTO-REVUO estas bela kaj serioza heroldo de tiu lando, kie nia movado ĝuas valoran protekton de la oficialaj instancoj, kaj varman fervoron de la ĝenerala publiko. Ne forgesu, ke en Vieno troviĝas la Internacia Esperanto-Muzeo, kaj ankaŭ ke ĵus en Aŭstrio eldoniĝis belega esperantista poŝtmarko. La gazeto detale informas pri la okazaĵo: «Kiam, la 25 Junio, la poŝtmarko unuan fojon estis oficiale eldonita, miloj da homoj paciencie atendis vice en, kaj ekster, la oficejo por akiri la markon kun speciala stampo; la ceteraj poŝtoŭficejoj de Vieno ricevis tro malgrandan provizon, por povi plenumi ĉiujn dezirojn de la publiko. La tuta eldonkvanto de tiu poŝtmarko estas unu miliono da pecoj». Imitinda kaj bonega pruvo de toleremo estas la najbareco, en la sama gazeto, de oficialaj informoj de plej diverstendencaj fakoj. En la katolika rubriko, oni skribas jenan raporteton, kiun mi ne povas ne kopii: «En Hispanio, Pastro Felix de Valois Arana, de la kongregacio de la misiistoj, filoj

de la Sankta Koro de Mario, raportas, ke li kun Katolika Junularo laboras por Esperanto». Li, inter alie, eĉ skribis al la hispana ministro por Nacia Eduko tiucele, kaj li ricevis jenan respondon: «Oni kun plezuro pripensas la enkondukon de Esperanto en la hispanajn lernejojn». Mi simple mencias la ĝojigan informon, kaj iras antaŭen. ESPE-RANTISTO SLOVAKA estas malnova konato nia; sur bonega papero, kaj per tre klara preso, paradas belaj literaturajoj; aparte interesa estas artikolo pri la ĝusta desegnado kaj presado de la verda stelo de nia samideano Martin Benka, konata kaj fama slovakaj pen-

tristo. Mi ne volas silenti pri rava soneto, de aktivulo I. Schoon el Haarlem, dediĉita al valencia amiko, kiu certe emocias ĝin dankas. Ho, kiel malgranda estas la mondo, por la esperantista familio! ESPERANTO-POST denove nin salutas kaj ĝojigas per la represo de la rakonteto de Santiago Ramón Cajal, el nia 6.^a numero, kun germanlingva traduko. En LA PONTO, oficiala revuo de Germana Esperanto-Asocio, aperas frontpaĝe alvoko, el kiu mi pinĉas jenajn liniojn; «Tri faktoj nun estas, kiuj donu al ni novajn instigojn: la novfondita Germana Federacia Respubliko, la espero al plibonigantaj ekonomiaj cirkonstancoj kaj la alproksimiĝanta aŭtuno». Sekvas la skandinava grupo. MALGRANDA REVUO, kiel kutime, logas pro sia formato kaj enhavo. Tikla estas la ĉefartikolo de Stellan Engholm «Neŭtraleco aŭ objektiveco». Jen denove la mistika gazeto LA DHARMO, oni legu el ĝi: «Amo estas, fakte, kelkfoje, tute senkompata; sed kompato preskaŭ ĉiam konservas la aspekton de la amo». SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN frande regalas siajn legantojn

per abundaj ilustroj kaj trafaj legaĵoj. Ankaŭ la sveda LABORISTA ESPERANTISTO proponas tiri lecionojn el la sperto; tre leginda estas la raporto pri la pasinta internacia kurso, sub protekto de la landa sindikataro: «La prepara laboro donis al ni ĝojon kaj malĝojon». La nederlanda ambasado fieras per la bela aspekto de du bravaj pioniroj: LA PRAKTIKO kaj HEROLDO DE ESPERANTO, ili ambaŭ ĉiufoje montriĝas pli ĉarme, kaj ili ambaŭ meritas la favoron de inteligenta publiko per multe da abonoj. Kun modesta sinteno, sed treege valora pro sia enhavo, estas LA PROGRESANTO, studfolio de la Nederlanda Ligo de Laboristaj Esperantistoj; ĝia nomo klarigas la celon; estu dirite nur, ke ĉiuj ĝiaj frontpaĝaj artikoloj estas frandaĵo por ĉiuj, kiuj ŝatas bone poluri nuancojn aŭ detale koni la difinitan sencan de apartaj vortoj de nia lingvo. Kaj fine mi fermas la liston per la honora broĉo de ESPERANTO, la taktoplena serioza organo de U. E. A. fokuso de la Movado, laŭ universala amplekso.

Mi haltis jam! Sub la milda influo de la ĵusa legado, kviete mi meditas pri la facila solvo, kiu certe estus por multaj gravaj problemoj, se la homoj ne serĉus sian feliĉon per la malfeliĉo de aliaj. Verŝajne, tro simple aspektas la rimedo, sed la komplikajn formulojn mi emas ja suspekto rigardi. Memoru mian rekomendon navigi la korojn, por plibonigi la agojn kaj delikate subtiligi la sentumojn, komprenante, ekzemple, kiel mi komprnas, la ĝemetojn de la sekaj folioj, kiuj daŭras en sia aŭtuna simfonio... kelkaj el ili, jam sur tero, aŭdigas mallaŭtajn kraketojn, kio ŝajnas homaj paŝoj; sed... ne, mi estas sola, kun la iluzio povi longe percepti ankoraŭ la varmon de via estimo. Kaj kredu vere, ke sole nur via simpatio estas garantio por la fantazio de

LA LEGEMA KOBOLDETO

CONTRASTE

Para los Juegos Olímpicos de Londres, y según dice la revista deportiva sueca «TIP», se dispuso del siguiente ejército lingüístico: 100 traductores y 60 comentaristas de la BBC, que, durante las emisiones, informaron en 24 idiomas distintos. Con todo este tinglado, sobre cuyo cuantioso dispendio no vale la pena de insistir, los extranjeros debieron recurrir a la mímica, a las frases estereotipadas... y a la desesperación. Sin embargo, en Bournemouth, con ocasión del último Congreso Internacional de Esperanto, se reunieron cerca de dos mil congresistas procedentes de más de treinta nacionalidades distintas; se discutieron muy diversos temas, se pronunciaron discursos y conferencias, se bailó, se hicieron excursiones, se banquetó, etc., todo ello sin emplear otro idioma que el Esperanto.

El contraste es bien patente, y aún lo es en mayor grado cuando el caos lingüístico se produce entre diplomáticos o científicos, ya que la mayor parte de los usuarios del Esperanto son personas sin relieve intelectual, quienes, con un esfuerzo mínimo, alcanzan un resultado práctico incomparablemente superior al logrado por los políglotas científicos o técnicos.

¡Con qué juicio irónico se considerará en un próximo futuro a las actuales generaciones! Algo así como al médico que se empeñase en curar las pulmonías con cataplasmas en la época de la penicilina... Aunque algo de eso aún sucede todavía.

● EN LA CENTJARA FESTO DE GOETHE ●

La tutan jaron oni dediĉas en la mondo por festi la naskiĝon de Goethe.

Je nomo de Hispanujo levigis la voĉo de Ortega Gasset, inda kantisto de la germana poeto; kaj liaj paroloj, en Nordameriko kaj en la propra doloranta Germanujo, forte resonis kiel potenco provo de unu el la plej signifoplenaj flozofoj de nia tempo. Aliaj hispanoj ankaŭ partoprenis, kun sukceso, en la centjaraj festoj.

Jam en la jaroj de la unua mondmilito, mi dediĉis artikolon al Sro. Ortega Gasset, kie mi montris lian entuziasmon por la germana penso.

Tiu amo al intelekta laboro de iu ajn homo kaj popolo troviĝas ĉiam sur politikaj aŭ militaj cirkonstancoj. La sinkretismo de Goethe altiris ĉiujn simpatiojn. La superhomo Goethe atingis la kreon de Tutmonda Literaturo, ĉie li serĉis ĉarmajn florojn por kulturi ilin en la germana ĝardeno. Tial li estis granda admiranto de Calderón, kiun li nomis «la kvintesenco de la kulturo».

Mi sentas min fiero pro ĉarma laboro, ĉar dum la daŭro de diversaj jaroj mi legis la tutan verkaron de Goethe en ĝia originalo; kaj poste, en germana universitato, mi povis konfirmi tion mem. Ankaŭ mi ripetis diversfoje la legadon de libroj kiel «Faŭsto», «Ifigenio en Taŭ-

rido», «La Lernojaroj kaj Migrojaroj de l'Majstro Vilhelmo», k. t. p.

Kiel hispano mi sentis tutkoran ĝojon, kiam aperis la tuta verkaro en hispana traduko (eldono Aguilar), kvankam mi nur komparis la unuan parton de «Faŭsto» kun la hispana belega traduko de Llorente. Mi rekomendas al niaj samlingvanoj la harmoniplenan versaron de la Valencia poeto. Oni scias, ke ekzistas ankaŭ traduko en Esperanto, kun antaŭparolo de nia glora amikino sinjorino Marie Hankel.

Por kompreni «Faŭsto» oni devus antaŭe koni, kiel eble plej, grandan nombron da verkoj de Goethe, sed tre utile super ĉio estos sin prepari unue per legado de «La Lernojaroj kaj Migrojaroj de l'Majstro Vilhelmo» kaj «El mia vivo» de la propra Goethe. La unua verko estas romano, la dua estas biografio, kaj «Faŭsto» estas poemo, kvankam ĉiam Goethe prezentas al ni variantojn pri la samaj temoj, Vilhelmo, Faŭsto kaj... Goethe estas unu persono, kiu rakontas alimaniere la samajn travivaĵojn kaj sentojn.

La tuta vivo, la tuta mondpercepto de Goethe respeguliĝas en tiuj libroj, precipe en lia ĉefverko «Faŭsto».

FELIKSO DIEZ MATEO

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● INGLATERRA.—El Ministerio Británico de Educación envió dos observadores oficiales al Congreso de Bournemouth, para que informasen respecto al uso práctico del Esperanto en la convivencia internacional.

● SUECIA.—En la Escuela Normal de Göteborg, ante un público escogido de 400 profesores y maestros, dió una interesante conferencia totalmente en Esperanto, el escritor chino Chun Chan Yeh, a su regreso del Congreso de Bournemouth.

● DINAMARCA.—El importante diario de Copenhague «Dansk Vandrelang» está publicando actualmente un curso de Esperanto para sus lectores.

● ESTADOS UNIDOS.—El «Congressional Record» presta atención al idioma internacional, publicando unas declaraciones del senador M. E. Tyding, en las que recordaba que durante el año 1910, en el estado de Maryland, ya se concedió permiso para la enseñanza del Esperanto en las escuelas.

● NUEVA ZELANDA.—A finales de año celebrarán su 15.º Congreso los esperantistas de aquel lejano país. El Ayuntamiento de Wellington, donde ha de celebrarse el acontecimiento, prepara en su honor diversos actos. Cartas y tarjetas postales, para figurar en una exposición, pueden enviarse al Sr. N. Hill, 15 Eagle Street, Karori, Wellington (Nueva Zelanda).

● AUSTRIA.—Un éxito completo ha sido la emisión del sello postal en homenaje al Esperanto, recientemente editado por decisión del activo esperantista Dr. Karl Dworschak, actual Director General de Correos en aquel país. Sólo durante los dos días que duró el Congreso Nacional Esperantista en Graz, se vendieron 20.000 en la estafeta postal instalada en el vestíbulo del local donde se celebraron las reuniones. Además, la oficina austriaca de Turismo ha editado un precioso folleto que se envía gratuitamente, franqueado con el sello esperantista, con sólo solicitarlo a la siguiente dirección: Austria Trafikoficejo, Esperanto-sekcio, Friedrichstr. 7, Wien, I.

● ARGENTINA.—Los esperantistas católicos argentinos acaban de constituir su propia organización; han editado un magnífico prospecto en español donde exponen convincentes argumentos en pro del Esperanto al servicio de los ideales católicos. Pueden solicitarse estos impresos a la Asociación Esperantista Católica Argentina, cuya Secretaría reside en el edificio de Nuestra Señora de la Piedad, calle Bartolomé Mitre, núm. 1524, Buenos Aires (República Argentina).

Paralelamente aumentan las subvenciones oficiales para la difusión del Esperanto. El Parlamento sueco acordó la concesión de 5.000 coronas para mantener cursos especiales para maestros. El Ministerio austriaco ha concedido otras 8.500 coronas a la Federación Esperantista Austriaca. El Ministerio de Cultura de Wurtemberg (Alemania), concede 500 marcos al Grupo Esperantista de Stuttgart. En el Brasil, las sociedades esperantistas de Porto Alegre y Río Grande do Sul han recibido también sendas subvenciones monetarias.

EL ESPERANTO Y EL TURISMO

Entre las publicaciones turísticas aumenta de día el uso del Esperanto. Últimamente han sido editados folletos sobre Copenhague, Budapest, Bournemouth, Praga, Bratislava y el Tirol austriaco. Solamente la oficina de Turismo del Tirol lleva editados las siguientes seis folletos ilustrados: «Tirol en somero», «Tirol en vintro», «Tirol», «Innsbruck», «Igls» y «Karwendel-montaro».

Otros folletos editados han sido: «Vintro en Slovaka Montaro» en Bratislava y «Koran Bonvenon en Graz!» con motivo del reciente congreso esperantista austriaco. También en Bulgaria la oficina del Estado BALKANTURIST acaba de editar un precioso folleto turístico con magníficas vistas de las diversas bellezas del país. Por último, la redacción de la importante revista suiza de turismo «Die Reise» ha decidido mantener correspondencia en Esperanto, a fin de conseguir fácilmente contacto con cualquier parte del mundo sin necesidad de traducción alguna.

NEPRE devas brili la verda
steio sur brusto de esperantisto



Ni havas stokon
je via dispono laŭ
apuda modelo
(butono aŭ broŝo)
po 6 pesetoj

Mendu tuj al
Hispana Esperanto - Federacio
RUZAFÁ, 7. VALENCIA

LA DHARMO

Organo de "Societo por Orienta Kulturo"

Aperas sporade en Svedio

Prezo: 1 pes. Jarkotizo kun gazeto: 6 pes.

Skribu al J. JUAN FORNÉ, Gil y Morfe, num., 24

VALENCIA

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto aŭ unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoneoj.

ANTONIO PASTOR. Ercilla, 49, 5.^o, Bilbao (Hispanio). Dez. interŝ, il. pkt. eksterlande. Certa respondo.

DENTTEKNIKISTOJ!—S.^o Ricardo de Luna, dez koresp. pri metiaj k. ĝen. aferoj kun eksterlandanoj. Paseo de Colón, 5, 1.^o, 2.^a Barcelona (Hispanio).

ARMANDO CORTES (17-jara) Plaza M. de Estella, 8. WALTER MANEZ (25-jara) Plaza Iglesia, 3. ambaŭ en CHESTE (Valencia) Dez. koresp. kun junaj gesamideanoj el ĉiuj landoj.

RAFAEL VIZCAINO. C. Maluquer, 5, pral. 8.^a Valencia. Dez. interŝ, p. m. kun ĉiuj landoj. Serioza propono.

JOSE NAVARRO. Calle Llull, n.^o 208, 4.^o, 1.^a, Barcelona, deziras koresp. kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj.
Nepra respondo!

HEF-ANO: Helpu la eldonadon de nia Bulteno aĉetante kroman ekzemplon por via eksterlanda korespondanto.
Unu ekzemplero, du pesetojn.

MAŝINOJ, MONO KAJ MONDPACO

(Socikreditano parolas)

«The Social Credit Co-ordinating Centre», de Nottingham (Inglaterra), percatado del papel que el Esperanto asume para la divulgación universal, ha editado—pulcramente, por cierto—este libro explicativo de sus ideales. El tema económico, árido de por sí, queda expuesto en forma sencilla y fluida, al alcance de todos los lectores. Sin entrar en el fondo de las tendencias económicas defendidas en dicho libro, como esperantistas si queremos resaltar el motivo que influyó para que «The Social Credit Co-ordinating Centre» empezase a usar el Esperanto como idioma de sus publicaciones, que hasta ahora era el inglés.

En 1946, un holandés interesado en dicha idea buscaba un corresponsal; leído el anuncio por una inglesa, pasó la dirección al Centro Coordinador, cuya secretaria escribió al holandés... en inglés. Pero publicados artículos sobre «Soci-kredito» en periódicos esperantistas por el entusiasta holandés, empezaron a llover sobre el Centro cartas y más cartas en Esperanto, demandando informaciones y datos... por lo que la secretaria tuvo necesidad de aprender el Esperanto. Percatados del importante papel a desempeñar por el idioma auxiliar internacional, se inició la publicación de impresos, circulares, folletos en Esperanto, hasta llegar al libro que reseñamos y que recomendamos vivamente a todo el que se interese por los temas económicos.

NEKROLOGO

Mezo de la jua pasinta Oktobro mortis
la bona patrino de nia amiko Luis Hernandez
Kvankam ni scias, ke li estas plene hardita en ĉiu speco
de malfeliĉo, ankaŭ ni scias, ke ĉi tiu bato plej kruela
lin trafis. Tial, la sincera kondolenco de la tuta Valencia
esperantistaro estas nur eta konsolo al lia ega doloro,
kiun ni komprenas kaj pie respektas

En Alceira, post longa kaj kruela
malsano, malaperis por eterne
RAFAEL GONZALEZ, nia fervora
samideano, kiu tiom kaj tiel
sindone batalis por Esperanto.
En la nuna etapo de nia movado
en Hispanio, li estis brava pioniro
kaj obstina iniciatinto. En
Madrid li postenis, kiel unua
delegito de I. E. L. post la milito.
Aktiva propagandisto, honesta
persono, lojala amiko: jen estas
la morala portreto de la forpasinta,
kiu plene meritas la kareson
de nia sincera kaj pura rememoro.